Fontos tudnivalók

Ehhez a vizsgarészhez szótár **nem** használható!

Munkaidő: 60 perc

A dolgozatpontok vizsgapontokká való átalakításának módját a Javítási-értékelési útmutató tartalmazza.

1. Kion ili diris? Trovu la parton, kiu mankas el la frazo kaj skribu en la tabelon la literon de la parto.
(0) estas ekzemplo por vi.

Mensogulo*

Estis iam reĝo. Foje la reĝo proklamis en sia lando:
„Kiu mensogos tiel, ke mi diru: tio estas mensogo, _____0_____."
Venis iu paŝtisto kaj diris:
„Longan vivon al la reĝo! Mia patro havis bastonegon, kiun li etendis kaj _____1_____."
„Tio povas okazi – respondis la reĝo. – Ankaŭ mia avo havis ĉibukon**, kies unu finon li metis en la buŝon kaj ____2_____."
La mensogulo foriris gratante al si la kapon. Venis iu tajloro, kiu diris:
„Senkulpigu min, reĝo, mi devis pli frue veni, sed malfruiĝis. Hieraŭ multe pluvis, fulmoj eksplodis, la ĉielo disŝiriĝis kaj ____3____."
„Vi bone faris – diris la reĝo – , sed vi malbone flikis***. Hodiaŭ matene _____4_____."
Ankaŭ la tajloro foriris.
Eniris malriĉa vilaĝano kun mezurpoto sub la brako.
„Kion vi volas povrulo?" – demandis la reĝo.
„Vi ŝuldas al mi unu mezuron da oro, kaj ____5____-."
„Unu mezuron da oro? – ekmiris la reĝo. – Vi mensogas, _____6_____."
„Se mi mensogas, ____7_____."
„Ne, ne _____8_____! – ŝanĝis sian vorton la reĝo.
„Nu, se mi pravas, _____9_____."

**mensogi: hazudik* ***ĉibuko: pipa* ****fliki: befoltoz*

Juna Amiko 91/4.

A. denove iom da pluvo falis
B. donu al mi la duonon de via regno
C. mi iris por fliki ĝin
D. donu al mi la mezuron da oro
E. la alian etendis kaj ekbruligis de la suno
F. mi oron ne ŝuldas al vi
G. al tiu mi donos la duonon de mia regno
H. mi venis por preni ĝin
I. miksis per ĝi stelojn en la ĉielo
J. vi pravas

0	1.	2.	3.	4.	5.	6.	7.	8.	9.
G									

2. Laŭ la suba teksto plenskribu la tabelon!
(0) estas ekzemplo por vi.

Nurmi

En 1997 la fama Usona revuo *Time* elektis la finnan sportiston, Paavo Johannes Nurmi (1897-1973) la sportisto de la jarcento.

La plej fama kuristo de mezlongaj distancoj de 1920-aj jaroj estis Paavo Nurmi. Liajn multegajn venkojn kaj mondrekordojn (24 oficialaj kaj 36 neoficialaj; en Olimpiaj Ludoj li akiris 9 orajn medalojn) novaj sportistoj jam superis, sed, siatempe, li estis la „fluganta finno", kiu akiris prestiĝon kaj eĉ altajn monsumojn por Finnlando.
En la fino de la 30-aj jaroj Nurmi soldatiĝis, Finnlando ja batalis kontrŭ Sovetio. Poste, li vojaĝis, ekzemple en Usonon por ekhavi helpon kaj simpation por la suferanta malriĉa patrolando. Li igis Finnlandon konata ĉie, kie li faris viziton.
Nurmi devenis el malriĉa laborista familio. En lernejo li montris sin ege talenta en ĉiuj fakoj krom muziko, sed post sia 13-a jaro li ne plu povis viziti lernejon, ĉar li devis subteni la malriĉan familion, kies patro frue orfigis la gefilojn.
Li dediĉis sian vivon al la sporto, ĉiam celante venkon. Pri siaj sentoj, malfacilaĵoj kaj atingoj, tamen, li ne ŝatis paroli. Li disfamiĝis pro seriozeco kaj neparolemo. Kelkaj kolegoj akuzis lin pro manko de bonaj manieroj, pro lia modesta, popola deveno. Kiel mezaĝulo li mem, foje, diris, ke li ne plu aprecas sporton. Estus pli bone fariĝi artisto aŭ sciencisto. En tiuj fakoj la atingoj estas pli longdaŭraj ol en sporto.
Post sia kariero en sporto Nurmi laboris kiel komercisto. Li kolektis artaĵojn, kvazaŭ sekrete iris aŭskulti koncertojn. Post malsaniĝo li donacis grandajn sumojn por la kuracado de kormalsanoj.
Liaj statuoj ornamas la urbojn Helsinki kaj Turku. Por festi la centjaran datrevenon de Nurmi oni okazigis kuradon ekde la statuo en Turku ĝis tiu en Helsinki.

Juna Amiko 1997/9.

0. Nomo	*Paavo Johannes Nurmi*
10. Naskiĝlando	
11. Naskiĝjaro	
12. Studoj	baza meza supera
13. Sporto	
14. Profesio (krom la sporto)	
15. Karaktero 1.	
16. 2.	
17. Sportsukcesoj 1.	
18. 2.	
19. Sportisto de la jarcento	en la jaro: elektita de:
20. Statuoj en urboj	en kaj

3. Laŭ la suba teksto decidu ĉu la asertoj estas veraj aŭ falsaj!
(0) estas ekzemplo por vi.

Pli ol toleremo

En memserva restoracio maljuna virino aĉetas bovlon da supo. Ŝi sidiĝas al tableto sub kiu ŝi pendigas sian mansaketon. Post momento ŝi reiras al la bufedo, ĉar ŝi forgesis preni kulereton. Kiam ŝi revenas al sia tablo, la sinjorino trovas tie junan afrikanon, nigrhaŭtan, harfrizitan, kaj bunte vestitan, kiu manĝas ŝian supon. Ŝi unue gapetas kaj mallonge pripensas; kaj post afabla rideto, ŝi antaŭenigas sian kulereton kaj ekĉerpas supon el la sama bovlo. Kaj ili kune manĝas. Fine de la manĝado la junulo iras aĉeti du tasojn da kafo kaj prezentas unu al ŝi. Kiam ili fintrinkas sian kafon, li afable salutas ŝin kaj foriras. La tuto okazis preskaŭ senvorte, ĉar ili ne parolis la saman lingvon.
Ankaŭ la sinjorino stariĝas por foriri, ŝi kliniĝas por repreni sian mansaketon el sub la tableto. Nenio plu! Malaperinta! „Li vere estis fiaĉulo! Mi devintus esti singardema ekde la komenco. Fi! Kia honto” – flustras al si mem la sinjorino, kies vangoj ruĝetiĝas pro kolero. Ŝi turniĝas kaj rigardas ĉiudirekten, sed jam tro malfrue: li malaperis.
Sed subite, sur apuda tablo ŝi ekvidas bovlon kun malvarmiĝinta supo, kaj sub la tableto, sian mansaketon, kiu pendas.

Bazaro 28.

	V	F
0. Kiam la virino sidiĝis, ŝi kunhavis supon kaj kuleron.		*x*
21. Ankaŭ afrikano sidis ĉe tablo.		
22. La afrikano fakte manĝis ŝian supon.		
23. La afrikano fakte manĝis sian supon.		
24. La maljunulino manĝis fakte lian supon.		
25. Dum la manĝado ili afable babilis.		
26. La virino volis esti tre tolerema.		
27. La viro estis tre tolerema.		
28. Ŝi retrovis sian mansaketon tie, kie ŝi lasis ĝin.		